



Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque.	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Ŝi — H. Rider Haggard	29,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
La Juna Vivo (1934-1935)	15,— »
Pallieter — F. Timmermans	35,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz.	18,— »
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy.	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,— »
Examenopgaven	12,— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,— »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 t.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel. : 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Postĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
H. VAN DURME kaj aliaj.

DANKESPRIMO.

La Organiza Komitato de la 7^a Flandra Kongreso elkore dankas ĉiujn gesamideanojn, kiuj iamaniere helpis ĝin en la antaŭkaj dumkongresaj laboroj.

Koregan dankon !

La Organiza Komitato.

Esperanto in de Praktijk.

ESTLAND

Bij besluit van het stadsbestuur van Tapa werd een der lanen dezer stad naar de internationale taal genoemd.

CHINA

Volgens de laatste gegevens leerden in China 30.000 personen de internationale taal. Er bestaan 50 vereenigingen, 5 bladen verschijnen in Esperanto.

TSJECHO-SLOWAKIJE

Volgende dagbladen publiceeren een Esperantorubriek: Pilsner Tagblatt, Westböhmische Tageszeitung, Südböhmische Tageszeitung, Marienbader Neueste Nachrichten en Egerländer Tageszeitung.

HONGARIE

Bij de Esperanto-uitgeversmaatschappij « Literatura Mondo » te Budapest, verscheen een Tsjecho-Slowakische antologie. Dit lijvig boek biedt in prachtige Esperanto-vertaling, een rijke keus uit de literatuur en behelst o. m. 32 bladz. kunstreproducties der beste werken van de beroemdste Tsjecho-Slowakische meesters.

De jaarbeurs van Budapest maakt steeds ruimer gebruik van Esperanto. Meerdere propagandadruksels werden in Esperanto uitgegeven, Esperanto wordt in haar briefwisseling gebruikt en tolken worden ten dienste der buitenlandsche Esperantisten gesteld.

IJSLAND

Het radio-zendstation van Reykjavik begon met het uitzenden van een Esperanto-kursus. De lessen worden door den IJslandschen schrijver Thorbergur Thordarson voor het mikrofoon gegeven elken Zondag van 13 u. 25 tot 13 u. 50.

NEDERLAND

Van 6 tot 16 Juli t. k. wordt de 3de internationale cursus voor het personeel van post, telegraaf en telefoon in het Esperanto-tehuis van Arnhem gegeven. Deze cursus wordt ingericht door het internationaal Esperanto-instituut van Den Haag in samenwerking met het bestuur der Nederlandsche P.T.T. en van den Nederlandschen bond der Esperanto Post- en Telegraafbedienden (I.L.E.P.T.O.). Het Nederlandsch postbestuur geeft aan de deelnemers een extra-verlof en noodigt, via de Wereldpostvereniging te Bern, het buitenlandsch P.T.T.-personeel uit, aan vernoemden cursus deel te nemen.

De « Nederlandsche Reisvereniging » (60.000 leden) organiseert een groepsreis voor haar leden naar het internationaal Esperanto-kongres te Weenen (8-15 Augustus).

Door het bestuur der Philips-fabrieken werden kursussen ingericht voor het personeel. Bedienden en arbeiders volgen regelmatig de leergangen.

Van Januari tot September 1935 verschenen 1500 krantenartikels of mededeelingen over Esperanto in de Nederlandsche bladen.

SOVJET-RUSLAND

Radio-Leningrad geeft voortaan driemaal in de week uitzendingen in Esperanto; elken Zondag, Dinsdag en Donderdag.

De fabrieken « Lomonosov » te Leningrad, gebruiken voor hun reclame Esperanto. De prijslijsten voor het buitenland zijn in Esperanto gesteld.

SPANJE

Het verbod, op briefomslagen of postkaarten propagandazegels te plakken, werd door het Spaansch postwezen niet toepasselijk verklaard op dusdanige propagandamiddelen voor Esperanto.

ZWEDEN

In 1936 organiseerde de Zweedsche vereniging voor arbeidersontwikkeling 538 Esperanto-kursussen voor 6.796 deelnemers.

**Bonvolu tuj repagi Vian
Kotizon !**

Waar Esperanto zich opdringt.

Waar menschen van verschillende nationaliteit samenkomen om hun belangen te bespreken, komt het somtijds tot gekke verhoudingen.

Hierbij denken we aan de konferentie tusschen Japansche en Nederlandsche scheepvaartondernemingen welke onlangs moest plaats grijpen te Kobe, maar jammerlijk mislukte. De Japanners wilden hun taal als de officieele, de Nederlanders stelden het Engelsch voor. Van Japansche zijde werd hierop aangemerkt dat het Engelsch een vreemde taal was voor beide partijen en bijgevolg ongeschikt. Ten einde raad sloegen de Nederlanders voor, het Engelsch, het Japansch en het Nederlandsch als officieele talen te gebruiken. Toen van Japansche zijde dit niet te verwezenlijken voorstel werd teruggewezen konden de Nederlanders onverrichter zake naar Nederlandsch-Indië, van waar zij gekomen waren, terugkeeren...

'n Ander geval is dat der internationale transportfederatie. Deze machtige organisatie kongresseerde in Augustus 1935 te Kopenhagen. Welke moeilijkheden er zich voordeden, moge uit het volgende blijken. De algemeene sekretaris las een verslag voor in het Engelsch, het hoofd der Nederlandsche afvaardiging hield moeizaam in het Duitsch — het Nederlandsch was niet als kongrestaal toegelaten — een lang betoog over de wisselwerking der internationale verkeersmiddelen. Elke voordracht werd viermaal vertaald. Men kan zich indenken op welke harde proef het geduld der deelnemers werd gesteld, wanneer men weet dat een der sprekers twee uur noodig had om zijn voorstel toe te lichten!

Al wie reeds zulk kongres heeft meegemaakt weet ook hoe erbarmelijk het daar toegaat. Leest men achteraf de verslagen, dan zou men denken dat alles vlot van stapel liep. Immers, van de taalmoeilijkheden, die aan dergelijke internationale bijeenkomsten niet vreemd zijn, wordt doorgaans geen gewag gemaakt. Ernstige gedachtenwisseling of bespreking is daar zoo goed als uitgesloten, de verwarring bereikt er ondenkbare hoogtepunten. Hoe vaak wordt niet de beknopte vertaling van een met vuur en overredingskracht gehouden betoog, op een nietszeggende, eentonige wijze voorgelezen. En wat te zeggen over de vertegenwoordigers van kleinere naties die, de vertalingen ten spijt, zich steeds moeten vernederen door een vreemde taal te gebruiken?

Hoe klinkt dit alles ongerijmd als wij weten dat de oplossing voor 't grijpen ligt. Onwillekeurig denken we aan de Esperanto-kongressen, waar in ieders mond de internationale taal weerklinkt en geen enkel der vernoemde hinderpalen afbreuk doet aan het wederzijdsch begrijpen.

In de betrokken middens stond men tot nog toe afwijzend tegenover Esperanto. Met vreugde kunnen we echter een kentering ten goede vaststellen. Waar Esperanto vroeger genegeerd werd, wordt nu vaak de internationale taal op gelijken voet gesteld met de gebruikelijke talen der internationale bijeenkomsten. Deze verheugende resultaten zijn niet zoozeer te wijten aan de taktvolle propaganda, jarenlang in deze bij uitstek behoudsgezinde kringen gevoerd,

maar blijken eerder het logisch gevolg te zijn der op velerlei gebied steeds noodzakelijker wordende internationale verstandhouding. Een niet te onderschatten faktor is ook de heropleving van het nationaal gevoel, welke de vertegenwoordigers van kleinere nationaliteiten het gebruik eener vreemde taal bezwaarlijk doet vinden.

Dat Esperanto op gelijken voet wordt gesteld met de groote nationale talen, is een eerste stap naar de eenige, redelijke oplossing: uitsluitend Esperanto als taal van het internationaal leven.

E. CORTVRIENDT.

Esperanto-movado en Flandrujo ?

Ankaŭ mi opinias ke ne ekzistas « movado » en Flandrujo, almenaŭ ne en Flandra Ligo, nek ĉe la estraro, nek ĉe la diversaj grupoj. Por la plimulto de la anoj de la Flandra Ligo, la ĉefpunkto de la programo, la nepra vivkondiĉo, la granda celo de la Ligo estas : la Kongreso.

La kongreso, sed ne la Ĝenerala kunveno, kiu « hazarde » je tiu okazo, ankaŭ troviĝas sur la programo ; ne, la kongreso signifas la dancadon sabate vespere, la dancadon dum la dimanĉa vespero, la festenon, kaj ankaŭ la revidon de ĉarma konatul(in)o el malproksima vilaĝo, urbo aŭ apuda lando.

Se vi dirus al multaj ligoj ke la kongreso estas nura, ETA rimedo, por en la elektita urbo iom propagandi nian ideon, ke ĝi do nur estas tutsimple loka propagandrimedo, sed multe pli neglekta ol ekzemple la konstanta, praktika, racia agado de la sekretaria laboro, ili mirus kaj dirus al vi « vi, maljuniĝanta seriozulo, vi ne ŝatas plezuron, vi estas fanatikulo ! »

Kaj tamen jen estas la kankro de nia agado, mankas al la plimulto de niaj anoj la idealemo, la kompreno de nia interna ideo, ili ne estas «esperantistoj» sed nur anoj de sekcioj kaj ligo, kiuj havigas al ili oportunecon amuzi sin, fari vojaĝon kiel ekzemple turista ligo, aŭ postlerneja socio.

Mi vetas ke se oni dum du jaroj ne okazigas kongreson, ne restos al Flandra Ligo la dekonono de ĝiaj membroj.

Kaj ne estas la kulpo de la anoj, se oni al ili ne donas la « spiritan panon », kiu vivtenas la idealon aŭ eĉ ĉe kelkaj ĝin vekas ! Ni havas belan monatan organon kaj ni ne uzas ĝin por tiu celo kaj mi en sekvonta tribuno montros kiel mi opinios ke savo kaj solvo estas troveblaj por Flandra Esperantisto.

L. CALLOENS — AALST

P. S. — Tiuj, kiuj ne samopinias bonvolu sendi respondon al la redakcio por ke ĝi aperu en la sama rubriko. Mi ne respondos al leteroj sendotaj rekte al mi tiurilate. L. C.

SUBTENO POR LA REVUO

A. G. Kortrijk, 20,— ; Debrouwere, 10,—.

Kio estas Via Opinio ?

Kiam antaŭ kelkaj monatoj S.ro Lodema ne plu povis plenumi la taskon de redaktoro, ni « Flandrema Grupo » transprenis tiun laboron sub gvidado de S.ro Schroeyers, sub kies nomo, komence de la decembra numero aperis nia revuo. Kiu ne jam estis redaktoro de iu gazeto, revuo, aŭ bulteno, ne scias kiom da laboro tiu tasko alportas. Ĉiuflanke oni nin promesis helpon, sed ĝis nun nur kelkaj ensendis artikolojn kaj ne ĉiam tiuj artikoloj povis esti publikigitaj.

Dum la lasta ligkunveno, S.ro Ornstein mallonge deklaris ke nia revuo ne taŭgas. Laŭ ni, tio estas iom tro akra. Ni ne kontraŭstaras ke ekzistas eble pli bonaj aŭ pli taŭgaj bultenoj, sed tio ne estas nia kulpo. Kaj se iu rajtas diri tiajn vertojn, certe ne decas al fremdulo kies unua celo estas vivi per Esperanto. Do, Sinjoro Ornstein diris ke nia revuo ne taŭgas. Denove, kiel la antaŭa redakcio ni volas fari enketon inter la legantoj, ĉar nur por ili servas la « revuo ». Ni demandas do al ĉiu abonanto deklari al ni, sian ideon pri nia revuo ; kiujn artikolojn li legas ĉiam, kiujn de tempo al tempo kaj kiujn neniam, kion li volus forfaligi, kaj kion li volus aldoni ; Ĉu li ŝatus ke en nia revuo aperos flandraj artikoloj, ĉu unu, du, tri paĝoj, aŭ la duono de la enhavo. Por koni ankaŭ la ideojn de la komencantoj ni petas ilin skribi flandralingve, por ke ili certe ne timu.

Kaj nun ni demandas kunhelpon al ĉiu Esperantisto. Ĉiu samideano kiu ajn devas kaj povas fari ion por ni, kaj do por la movado. Mi mencias nur kelkajn manierojn : 1) Skribi aŭ traduki artikolon, aŭ se li ne ankoraŭ kapablas, aŭ ne havus sufiĉe da tempo, transdoni flandrajn tekstojn, kiuj laŭ li estas interesaj. Tiam ni tradukos ilin. 2) Varbi novajn abonantojn, lernantojn kaj anoncantojn. 3) Preskaŭ ĉie foriris de la grupoj malnovaj esperantistoj pro diversaj kialoj, kaj ofte pro malinterkonsento kun unu aŭ du aliaj membroj. Estas la devo de la aliaj membroj repacigi tiujn membrojn kaj tiamaniere redoni ilin al la movado. 4) Helpi nin per mondonaco laŭpove. 5) Ensendi premiojn (librojn, flandrajn aŭ esperantajn), jarkolektojn de iaj gazetoj kaj bultenoj, k. t. p. por la problemoj, ĉar la krucvortenigmoj meritas vian atenton : estas unu el la plej bonaj kaj agrablaj metodoj por en kelkaj monataj multe pliriĉigi vian vortaron. Kaj nun ĉiuj al la laboro, ne pensu : la aliaj faros ĝin por mi. Vi estas esperantisto, kaj do devigata fari ion por via idealo. Ni devas montri ke la flandraj Esperantistoj vivas, ni devas labori por ke en malmulta tempo en nia lando la vicleco egalu tiun de niaj nordaj najbaroj, ekzemple. Tiam S.ro Ornstein ne plu devos diri ke ni estas la plej malprogresemaĵ esperantistoj, kiujn li iam renkontis.

SREDLOV

Varbu por Via Revuo !

Propagando

Dimanĉe, 10-an de Majo 1936, okazis en Kortrijk, ejo Vlaamsch Huis, publika parolado kun lumbildoj pri Ĉinujo, de Pastro Franciskano J. B. Kao.

Aŭdinte ke Pastro Kao nunmomente studas ĉe la Katolika Universitato de Rijsel, la grupo Kortrijk tuj interrilatis kun li kaj sukcesis aranĝi paroladon sub aŭspicioj de la « Davidsfonds ».



Cirkuleroj kun bildo de la pastro kaj afiŝoj kun fantasiaj ĉinaj literoj kreis la favoran atmosferon por allogi la publikon kuriozan je ekzotikaj aferoj. Sekve, malgraŭ la tiel nomite « malfavora sezono », preskaŭ 200 personoj estis en la salono.

Pastro Kao parolis esperante kaj tradukis la nederlanda samideano Henk Thien. Estis bonega pruvo pri la praktika uzebleco de Esperanto inter

personoj de diversa nacieco kaj kontinento.

Nun ke tiom da personoj ariĝis, la grupo kompreneble profitis la okazon por propagandi la movadon. La salono estis ornamita je afiŝoj kaj precipe tiu de Isermonumento interesis pro la kvin-lingva teksto, inter kiu Esperanto.

La sekretario de F.L.E. enkondukis kaj klarigis la celon de Flandra Ligo kaj la starpunkton kiun devus adopti ĉiuj konsciaj Flandroj.

Post la parolado de Pastro Kao, kiu rikoltis aplaŭdegojn, samideano Thien prezentis demonstracion de Cseh-metoda leciono. Diversajn fojojn oni jam vidis provleciojn sed verŝajne neniu jam vidis lecionon tiel lerte gvidata ol kiel faris S.ano Thien. Sen troigo oni povas nomi lin artisto de la nova instrumentado. Estis ĝuo de la komenco ĝis la fino kaj la rezultato estis tiom mirinde ke ĉiuj ĉeestantoj foriris balbutante esperantlingve...

La provlecio de S.ano Thien atestis ke erare oni kutime diskutas la valoron de la metodo anstataŭ tiun de la profesoro.

* * *

Ĉiuj grupoj kaj ankaŭ multaj izolaj esperantistoj ricevis proponon, plurfoje ripetitan, por aranĝi propagandan vesperon kun helpo de S.ano Thien.

Malgraŭ la tre favoraj kondiĉoj, la rezultato estis iom seniluziiga por la organizanto. La kialoj por rifuzi estas plej variaj. Diversaj profetis : ne sukcesos pro manko je intereso. Kiel antaŭscii ke ne estos intereso se oni ne provas ?

La sezono estas same « malfavora » en Kortrijk, Ronse, Roeselare, Veurne, Nieuwpoort, Deinze, Brussel, Antwerpen kaj Mechelen kiel en ĉiuj aliaj lokoj. Por refuti la ridinde « malfavoran » argumenton, la sekretario de F.L.E. kun helpo de samideano kiu loĝis

tie nur de 5 tagoj, aranĝis paroladon en la vilaĝo Vichte, kiu kalkulas ekzakte laŭ lasta popolnombrado 2.052 da enloĝantoj. Propagandmaniero : anonco en regionaj gazetoj kaj disdono de 250 cirkuleroj dimanĉe post la diservo. Rezultato : 30 ĉeestantoj : kolektita sumo por la paroladisto 74 fr. ; post Pentekosto komenco de kurso !

Ankaŭ en Veurne ne estas esperantistoj sed S.ro Somerling el Nieuwpoort tamen riskis la organizon. Post konstato de la rezultato en Kortrijk, S.ano Vanderlinden el Astene faris la samon en Deinze.

Jen provoj ke se ni ne autauĝeniras sufiĉe rapide, ni ne plendu pri la inerteco de la publiko; la kaŭzo restas en manko je entuziasmo ĉe la propagandistoj. Oni ne plu venu al la kunvenoj por ĝemi pri krizo aŭ similaj ridindaĵoj. Forskuu vian propran apation ; via entuziasmo fariĝu epidemia kaj la verda stelo kun nova brilo baldaŭ ree pendos super Flandrujo.

Kritiko

Sub tiu titolo aperis en « Espero Katolika », Marto 1936, artikolo el kiu ni ĉerpas ĉi-suban parton :

Kritikon mi ŝatas. Sed ĝi estu bona. Tio estas : ĝi estu vera, bonfundata, kaj konstrucela. Certe, simpati-esprimoj estas agrablaj, kaj utilas pro tio, ĉar ili donas novan kuraĝon por plua laboro, precipe se ilin akompanas certigoj pri kunlaboro. Sen tio la simpatio mem estas senutila. Utila tamen estas bona kritiko, ĉar ĝi montras al ni ne nur bonvolon, sed samtempe montras mankojn, kiujn ni forigu, kaj danĝerojn, kiujn ni evitu, samtempe indikante laŭirendajn vojojn kaj uzendajn rimedojn.

Pri kritiko nevera mi silentu. Mi ĝin metas en mia arĥivo inter centoj da aliaj paperaĵoj, kaj ne plu ĝin atentus.

Sed kion diri pri kritiko, kiu esprimas dubon pri la valoro de la teksta enhavo de nia organo ? Mi tiun kritikon ŝatus, se oni samtempe montrus la vojon, aŭ donus rimedojn por havigi al ni pli taŭgajn artikolojn. Sed se ĝi, ne farante tion, samtempe ofendas niajn fidelajn kunlaborantojn, kiuj almenaŭ faras sian eblon, kaj uzas sian tempon kaj monon por interesiĝi nian organon, tiam vi, kara leganto, komprenas, ke tian kritikon mi abomenas.

Nur tiu rajtas kritiki, kiu havas la konscion, ke li mem uzas siajn kapablojn por plialtigi nian revuon, aŭ, ne havante mem tiujn kapablecojn, kritikante samtempe donas sugestiojn, nomas personojn, kiuj estas kompetentaj kaj eble bonvolas kunlabori, aŭ montras rimedojn por akiri kunlaborantaron, kiu kapablas meti nian organon sur pli altan nivelon.

P.A.S.

Pastro Damiano kaj Dro Zamenhof.

Dum la lastaj semajnoj oni parolis kaj skribis multe pri Pastro Damiano, kiu senegoisme oferis sian vivon por helpi la malfeliĉajn leprulojn. Li mem estis viktimo de ĉi-tiu terura malsano en la

jaro 1889 sur la insulo Molokaï. La restaĵoj de ĉi-tiu formortinta bonfaranto estis enŝipigitaj sur la belga lernejsĥipo « Mercator » al Antwerpen por esti metata en kripton en unu el la monaĥejoj en la ĉirkaŭaĵoj de Leuven. El ĉiuj regionoj de la lando eĉ el eksterlando la simpatiuloj fluis al Antwerpen per ŝipo, per vagonaro, per aŭtomobilo, k. t. p. Preskaŭ kvindek jarojn, la regnestraro memoras pri la agmanieroj de unu el siaj samlandanoj kaj kiel rekompencon donas al li grandiozan funebran procesion en lia patrujo. Tio estu konsolo por lia familio.

Samtempe mi pensis al alia bonfaranto de la homaro, kiu certe ne laboris sur tia tragika kampo, sed kiu donis sian junecon, sian vivon ne nur por parto sed por la tuta homaro ; kiu klopodis pro amo al la homoj, por la tuta mondo, kompili lingvon, per kiu ĉiu havos la okazon komprenigi sin al sia kunhomo. Tie-ĉi mi celas la kreinton de ESPERANTO, la internacia helplingvo : Dro Zamenhof, al kiu ni ŝuldas multan dankon. Baldaŭ (1937) forpasos kvindek jaroj, post kiam li aperigis sian unuan eldonon en tiu-ĉi lingvo (1887). Nuntempe oni povas kalkuli je centmiloj da partianoj en ĉiuj landoj de la mondo. Pli kaj pli oni devas konfesi ke tio ekigas neceseco. Regnestroj el diversaj landoj jam donis en tiu ĉi afero sian efektivan helpon.

Ni ne dubas ke ankaŭ la belga regnestraro ne retenos sian helpon, kiam, kiel anoncis la « Handelsblad van Antwerpen » — tuj post la kunmetiĝo de la nova regnestraro — estos farata leĝpropono : « ENKONDUKI ESPERANTON EN LA PROGRAMON DE LA LERNEJOJ ».

Oni ne demandas statuojn, oni demandas nur kiel rekompencon por la bonfarantoj : *amon kaj pacon !* Tiu-ĉi por la bonfarto de la homaro. Ni esperas ke ĉi-tiun fojon la Belgoj donu la bonan ekzemplon !

JEVA

La Genta Kongreso !

Melodio « La bluaj Okuloj ».

Kiu dubas pri l' granda sukceso
De la Flandra Kongreso en Gent'
Li eraras, ĉar laŭ la promeso
Ĝi ja estas de ĝojo torent'.
La gesamideanoj agrablaj
Estas bildo de paca estont'
Kaj festkomitatanoj afablaj
Bonvenigis nin en gaja rond'.

REKANTAĴO

Dum Genta Kongres'
La granda sukces'
Regas la ĝojo de Flandra Kermes'
Dum Genta Kongres'.

Geamikoj nomate fremdlandaj
Reformiĝas en flandra aer'
Lingvodiferentecoj tre grandaj
Tuj forflugas per kant' de l' « Esper' ».
Ili kantas, kunvenas, pristudas,
Sub instigo de l' amideal'
Kaj se fine orkestro ekludas,
Jen resonas tra l'ejo de l' bal' :

Kaj se morgaŭ la geamikaroj
Forveturos sub bona impres'
Laŭte bruos sur la vagonaroj
Gojokanto pri l'Genta kongres'.
Ni forvetas ke tuj en Flandrujo
Kaj en tut-okcidenta Eŭrop'
Ofte kvazaŭ triumf-halelujo
Resonegos la kant' de la « Strop » !

Pol VAN DER POEL

La Stelo verda

Melodio : « La bela Muelilo ».

Okazis kvazaŭ en fabel'
Ke li renkontis ŝin,
Ĉar lin allogis verda stel'
Sur brust' de l' belknabin'.
« Kion signifas la simbol' ? »
Ĝentile petis li,
Kaj sonis kiel orakol'
Ĉi bela melodi' :

REKANTAJO

La stelo verda, la stelo verda,
Simbolo estas de paco kaj esper'
La stelo verda, la stelo verda,
Per Esperanto triumfos sur la ter'.

Eklernis li tuj kun fervor'
La lingvon de la mond'
Kaj al li la knabina kor'
Nun estis por estont'.
Ili promenis laŭ river'
Kaj post dolĉega kis'
Resonis tra la fru-vesper'
Lulata sur la briz' :

Se por vi, samideanin'
Ne estus aventur'
De trubador' kun mandolin

De dolĉa amojur'
Ke tamen brilu verda stel'
Sur la fiera sin' ;
Car viv' ne estas nur fabel'
Ni ne forgesu ĝin.

Pol VAN DER POEL

La Kongreso dancos

Sub tiu devizo okazos la kostumbalo dum la Universala Kongreso en Wien. Oni ĝenerale trovas tion tre nature, sed tiuj kiuj havis la feliĉon studi la historion staras iom perfleksaj. Precipe rilate al la nuna stato de la Esperantomovado, ĝi estas tre sugestiga. Ne malkonvenas foje atentigi ĉi-tie pri la historia signifo de tiu devizo.

Post kiam Napoleon estis konkerinta la Orienton de Eŭropo kaj ke li prenis sub sia mano la restaĵojn de nia mondparto, lia malprospero komencis per la malfeliĉa marŝado en Rusujo (1812). Post la malvenko apud Leipzig (1813), kie monumentego memorigas al tiu batalo, ĝi rapide kondukis al lia kompleta falo kiam la aliĝintoj de ĉie enmarŝis Francujon kaj fine staris antaŭ Paris. Ili eniris Parizon 31 Marton 1814. Ili sendis Napoleon al la insulo Elbe. Doneve oni volis Francujon reĝlando. Oni elektis la fraton de Ludoviko XVI. La nova reĝo volis porti la nomon de Ludoviko XVIII. Tiel li volis komprenigi ke Ludoviko XVII (la malfeliĉa infano de la « Templo ») vere estis reĝo kaj ke ĉio alia okazis nelegale. Sed estis, krom tio, ankoraŭ multaj aferoj aranĝendaj, i. a. oni devis decidi pri la sorto de Belgio, kiu estis postulata kaj de Prusujo kaj de Nederlando. Pro tio oni akordiĝis kunveni en Wien, post du monatoj. Anstataŭ tio, oni alvenis nur la 22-an de Septembro. Oni starigis festkomisionon kaj la kongreso estis neinterrompita festo. Tiel ke belga aŭtoro en Wien, Princo de Ligne, rajtis skribi : « Le congrès ne marche pas, il danse » (La kongreso ne marŝas, ĝi dancas) (1). Sed subite disvastiĝis la novaĵo ke Napoleon estis reveninta el Elbe. Rapide oni devis aranĝi la ankoraŭ grandan restaĵojn !!!... Pri la pasinta kongreso oni povis diri « La kongreso vojaĝas ». Nunjare oni diros ! La kongreso dancas ». Mi havas nenion kontraŭ tio... sed mi nur esperas ke dume oni ne forgesu labori. Estas ankaŭ ĉe ni multaj aferoj aranĝendaj ! i. a. U. E. A. devas akcepti « Flandran Ligon » kiel nacian (ne fakan !) organizaĵon.

F. R.

(1) En la franca lingvo oni diras : io ne marŝas » en la senco : « io ne progresas ».

Kruelega Postlasaĵo el la mondmilito !

En Vieno « vivas » okdek viroj, kiuj estas mortintaj por la mondo kaj por sia familio.

El Vieno estas komunikita :

Unu el la plej teruraj heredaĵoj de la Mondmilito troviĝas ĉi-tie sur la kampoj de la granda Viena Frans Jozefo-malsanulejo. Sur izolata parto de tiuj kampoj staras malgranda konstruaĵo. Fremdu-

loj ne povas alproksimiĝi, kaj ekflegistoj de la malsanulejo, kiuj konas la sekreton, forrestas propravole el la ĉirkaŭaĵo. La solaj kiuj povas eniri, estas seso da kuracistoj, ĉiuj elektitaj kun granda atento; kaj proksimume 25 flegistinoj. En tiu domo « vivas » okdek « mortintaj homoj », viktimoj de la mondmilito. La mondo kredas, ke ili estas mortintaj. Eĉ al iliaj familianoj estas oficiale sciigita, ke ili batalpereis: sur la oficialaj mortlistoj ili troviĝas inter la nomoj de tiuj, kiuj mortfalis sur la kampo de l'honoro.

Sed ili ankoraŭ ĉiam vivas.

La kialo de ilia sekreta izolado estas ilia kruelega aspekto kaj kripligo okazitaj per bomboj kaj venengasoj.

Ĉiu el tiuj okdek kvazaŭmonstroj, kiuj iam estis plenfortaj junuloj, estas nun tute paralizita, blinda, muta kaj surda.

La sola, kion ili povas fari estas, laŭ iliaj flegistoj spiri kaj manĝi. Neniu scias kaj neniu iam scios, kion ili pensas — se ili estas ankoraŭ kapablaj pensi, — kaj kiajn torturojn ili suferas, ĉar neniu sono eliĝas iam el inter iliaj lipoj. Ili kuŝas en litoj, kiuj havas la formon de tolaĵkorboj, en kiuj ili povas esti pli facile flegataj ol en ordinaraj litoj.

Kelkaj estis ankoraŭ buboj, kiam la milito eksplodis, kiu ilin misformis kiel estaĵoj pli senhelpaj ol infanoj.

Dum tiuj dek-ok jaroj, ili vivis en siaj « tolaĵkorboj », kiel mutaj atestantoj de la mondmilito. Aro da speciale instruitaj kuracistoj gardas pri ili, ĉion farante por plidolĉigi iliajn torturojn.

*Tradukis : VANDERLINDEN Maurice,
Astene.*

KENNISGEVING

WIJ GEVEN..... 200 FRANK

voor de schoonste foto met uitsluitend reproductierecht voor ons en best geschikt voor cliché (proefafdruk zwart op ongekorreld papier), welke ons naar een pauw (dus op z'n mooiste genomen) voor 1 Juli 1936 wordt toegezonden. De pauw dient eene beeldmaat van ten minste 8 cm. hoogte te hebben. Naam en adres van deelnemer dient op de keerzijde der foto geschreven. Onbekroonde fotos worden terugbezorgd.

IEDEREEN MAG MEEDOEN :

inzenden aan de N. V. CHROMA, Clichéfabriek,

Van Spangestraat, 14, Antwerpen-Centrum.

Diversaĵoj

LA ESPERANTO-DOMO EN ARNHEM, kore invitas ĉiujn gesamideanojn al libertempoj, renkontoj, semajnfinaĵoj kunvenoj kaj speciale al la someraj kursoj.

La Esperanto-Domo estas ideala renkontejo kaj libertempejo de ĉiulandaj geesperantistoj. Ĝi kuŝas en belega parko kaj ĝia hotelo por 50 gastoj estas instalita kun ĉiu moderna komforto (fluanta akvo, centra hejto, varma akvo, leg-kaj skrib-salono, biblioteko, ĉiuspecaj societaj ludiloj, fortepiano, bonega kuirejo, k.t.p.).

En la Esperanto-Domo estas aranĝataj studaj kaj amuzaj kunvenoj, kaj agrablaj ekskursoj al la belega ĉirkaŭaĵo de Arnhem.

Prezoj : Ĉambro kun matenmanĝo : 2,50 — 2,25 aŭ 2.— guld.; pensiono (ĉambro kaj la tri manĝoj) : 3,50 — 3 aŭ 2,50 guld., laŭ la rango de la ĉambro (unu-lita, 2-4 lita, 5- aŭ pli-lita). Apartaj manĝoj kaj trinkaĵoj laŭ tarifo. Servmono 10 %. En la komunaj ĉambroj la litoj estas apartigitaj per kurtenoj. Por infanoj pli malaltaj prezoj.

Adreso : ESPERANTO-DOMO, ARNHEM.

(Esperanto laan 3. — Telefono 26060. Atingebla per tramlinio I, haltejo Huygenslaan).

LIBERTEMPADO DE BRITAJ GEESPERANTISTOJ en la Esperanto-Domo en Arnhem, 25 Jul. — 1 Aug. 1936.

Dum la supre indikita tempo en la Esperanto-Domo libertemposocieto de britaj geesperantistoj. Ilia vojaĝon organizas la Brita Esperantista Asocio (142 High Holborn, London W. C. I.), kiu donas detalajn informojn kaj akceptas la aliĝojn. — Por ebligi internacian kunestadon, ankaŭ por ne-britaj gastoj estas rezervataj ĉambroj en la Esperanto-Domo por tiu tempo. Ne-britoj, kiuj deziras loĝi en la Esperanto-Domo dum tiu tempo, bonvolu frue mendi ĉambron, ĉe la oficejo de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Hago.

INTERNACIA RONDVOJAĜO TRA NEDERLANDO kun centro en Arnhem, 17-22 Aŭgusto 1936.

Je la invito de la Nederlanda Fremdultrafika Unuiĝo, la Cseh-Instituto, en kunlaboro kun la Direkcio de la Nederlanda Stata Fervojo, organizas unu-semajnan internacian rondvojaĝon tra Nederlando, je speciala tre rabatita prezo. La programo aperas en aparta detala informilo. La gastoj loĝos en la Esperanto-Domo en Arnhem, de kie ili forveturos ĉiumatene al alia parto de la lando, kaj vespere revenos. Vizitotaj lokoj : Amsterdam, Volendam, Marken, Kasteloj de Gelderland, Hago, Scheveningen, 's Hertogenbosch, Brabant, Alkmaar, sekigado de la Suda Maro, Rotterdam, Hoek van Holland, Waalhaven, k.t.p. — Oni petu detalan informaron de la Cseh-Instituto.

SOCIETO DE ORIENTA KULTURO

Societo de Orienta Kulturo, kiu celas diskonigon kaj disvastigon de Japana kaj Orienta Kulturo per Esperanto, serĉas kunlaborantojn kaj agentojn en ĉiuj landoj tra la mondo.

Kunlaborantoj (kondiĉe almenaŭ estu A. K.) skribu al « Orienta Kulturo » aktualajn artikolojn pri historio, folkloro, arto k. t. p. Por la *agentoj* kiuj varbas subtenantojn aŭ abonantojn de « O. K. » oni rabatas 20 % de la sumo, kiun oni sendos al SOK.

MEMBRECO : por unu jaro : Aktiva M. 6 svis-frankoj ; Pasiva M. 4 svis. frankoj ; Subtena M. 10 svis. frankoj (aŭ samvalora res. kup.) Adresu al KIJO CUJUKI. Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka, 326, TOKIO. Japanujo.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵojn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

HINDO RIGARDAS SVEDLANDON, L. Sinha. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 1. 200 paĝ. Prezo : broŝ. 3,75, bind. 5,— sved. kr.

Dum la lastaj jaroj oni renkontis en la esperanta gazetaro ofte la nomon de Lakshmiswar Sinha. Plej ofte la kronikoj rakontis pri liaj sukcesaj prelegoj en Svedlando, sed li vizitis ankaŭ aliajn eŭropajn landojn, eĉ Islandon kaj la Feroajn Insulojn.

S-ro Sinha antaŭ kelkaj jaroj venis Svedlandon por tie studi svedan slojdon. Hazarde li konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin. Per tio li ricevis multajn amikojn svedajn, kaj oni petis lin fari antaŭ esperanta publiko prelegojn pri sia interesplena hejmlando. Tion li ankaŭ faris, kaj la famo de la nova hinda samideano disvastiĝis rapide tra la lando. La sekretario de la landa asocio organizis prelegvojaĝojn, kaj S-ro Sinha kelkfoje traveturis kiel prelegisto la vastan landon.

Post kelktempa restado en sia hejmlando li denove venis Svedlandon, kie li estis plej kore salutata de la esperantistoj. Kvankam li volis sin dediĉi nur al studoj pri la lando kaj precipe ĝia slojdo, li devis denove fari prelegvojaĝojn. Antaŭ sia reveturo al la hejmlando en la malproksima oriento li volis esprimi sian simpatian al Svedlando kaj ĝia popolo. Pro tio li nun verkis libron, kiu ricevis la titolon « *Hindo rigardas Svedlandon* ». La aŭtoro montras en ĝi, ke li tre bone konas la landon kaj ĝian popolon. Li vizitis ĉiujn provincojn kaj kun granda amo li priskribas ilian variantan naturecon kiel ankaŭ la amindajn ecojn de la popolo. Post nelonga enkonduka ĉapitro kun ĝeneralaj informoj pri Svedlando kaj ĝia ekonomia vivo sekvas ĉapitroj pri Stockholm kaj lokoj ĉirkaŭ la lago Mälaren, Gotlando — la estinta reĝino de Balta Maro, Dalarna — la koro de Svedlando, Vermland — la lando de Gösta Berling, Smaland kun la urbo de alumetoj k. t. p. Li priskribas vizitojn ĉe fiŝistoj kaj ĉe Laponoj, plej nordaj loĝantoj de la lando. En du tre interesaj ĉapitroj la aŭtoro vigle priskribas la svedan slojdon kaj svedajn morojn kaj kutimojn, kiujn li trovis rimarkindaj.

Antaŭparolon verkis la profesoro ĉe la Universitato en Uppsala Björn Collinder.

La interesan kaj je faktoj tre riĉan libron plibeligas ne malpli ol 128 bildoj.

La libro de Sinha sendube kaptos la intereson de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Estas maloftaĵo ke orientano tiel serioze studas la naturon kaj kulturan vivon de okcidenta lando, ke li poste kapablas verki riĉenhavan libron pri la temo, kaj en la historio de la esperanta literaturo tio estas ĝis nun unikaĵo.

KATALOGON PRI originalaj aŭ trad. verkoj en Esperanto eldonis El. Soc. Esperanto, Stockholm. 1. Inter la plej gravaj verkoj en la katalogo estas Sveda Antologio, Gösta Berling (de Selma Lagerlöf), la nova libro pri Svedlando verkita de Lakshmiswar Sinha, k. c. La

katalogo estas ricevebla rekte de la eldonejo aŭ el la ĉefaj esperantolibrejoj en diversaj landoj.

ORIENTA KULTURO. Kvaronjara Bulteno.

Orientalisma kaj Japanisma Revuo en Esperanto aperos en julio kun granda misio por krei la tutmondan kulturon. Laboro estas granda, ĉiu vera esperantisto tamen povas helpi nin per aliĝo al « SOK ».

ENHAVO de No 1 : — Nia Misio, Tendenco de tutmonda historio, Japania historio, Aina literaturo, Noo-masko, Rakontoj pri Japanaj kasteloj, k. t. p. — ĉiu modela stilo rafinita.

No 2 : — Historio de Japania Sintoismo. — aperos en oktobro.

Ni nur sendas nian Bultenon al jarabonantoj (4 sv. fr. aŭ samvalora res. kuponoj) kaj subtenantoj (6 sv. Fr. : 10 sv. fr. : 20 sv. fr. : 50 sv. fr. : 100 sv. fr.).

Krome de ĉi-supra bulteno laŭtempe ni eldonas librojn pri Orientalismo kaj Japanismo.

Ni petas vin sciigi nian entreprenon al aliaj esperantistoj kaj instigi ilin aliĝi al Societo de Orienta Kulturo.

Administracio kaj Redakcio : Kijo Cujuki, Komagome — Dozaka, 326, TOKIO, NIPPON.

STALA BIBLIO DE SAMURAIISMO pri japana glavo — de Kijo Cujuki. Akirebla per du Res. kuponoj.

Baldaŭ aperos « *JAPANA MITOLOGIO* » de K. Cujuki, kun 400 p. 30 ilus. luksa bindo, prez. 10 sv. fr. af.

Grupa Vivo

BRUSSEL — N. E. L. E.

Ni ekzamenis la inviton de la ligo organizi paroladon de S.ano H. Thien. Nia sekcio decidis organizi du paroladojn. La 27-an de Majo nia nederlanda gasto, S.ano H. Thien, paroladis Esperantlingve por la Brusela Esperantistaro. La sekvantan vesperon, je la 20-a horo en « Vlaamsch Huis » (Groote Markt), propagandcele en Nederlanda lingvo. Tiun duan paroladon ni organizis en kunlaboro kun la loka V. T. B.-sekcio.

RONSE — LA PACA STELO.

Ĉiam vigle nia grupo laboras al la progresado de nia movado. La ekskursoj nun estas jam komencitaj kaj sur nia somera plano troviĝas io por ĉies gusto. Ni vojaĝos piede, bicikle, vagonare kaj aŭtobuse, nur la aviadiloj mankas pro kostoj tro altaj.

Jam de nun la estraro pridiskutas elblecon por fari grandegan propagandon por la venontaj kursoj, kiuj komencos en Septembro proksima.

La grupa organizo ĉiam pli kaj pli iĝas laborema, kaj kun intereso mi povas sciigi al la ekster-Ronsanoj ke nia biblioteko pliriĉiĝis per multe da volumoj. La estraro aĉetis ĉe F. I. por ne malpli ol 700 Fr. da novaj libroj.

En la kongreso Flandra Esperantista, ni postenas kun bela respekta nombr.

La angulo de la serĉemuloj

Solvo de problemo 4 : FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA. Pro malgranda eraro la solvado iĝis multe pli facila : la novaj vortoj devis esti substantivoj. : sulfuro, lanterno, familio, flanelo, divano, kamero, insekto, madero, miraklo, granato, gantaro, antaŭulo, pardono, anatomio, ansero, teraso, pilaro, araneo, arterio, arsenalo, armeno, tartaro, tirano, satiro, aristo, kataro.

Solvo de problemo 5 : LA SEPA FLANDRA ESPERANTO KONGRESO OKAZOS EN GENT. La gajnantoj de la premioj estas: S.ro TAYLOR el Halifax (Ang.), kaj F.ino STOLLMAN el Eindhoven (Ned.).

PREMIOJ : Ni jam ricevis premiojn por la krucvortenigmoj de : Anonimulo, Jeva, Nekonatulino, Nekonatulo, Draw, F.ino Mertens. Nian koran dankon ! Kiu sekvas ?

PROBLEMO 7. — ELEKTRA STARLAMPO.

ATENTU ! Tiu-ĉi krucvortenigmo estas iom pli malfacila. Por kuraĝigi la solvontojn ni forlotumos tiun-ĉi monaton KVAR belajn premiojn inter la ensendantoj, kiuj akiros la 8/10 de la poentoj. Ĉiu vorto valoras unu poenton. La difinoj kun (R) estas radikvortoj.

Solvoj sendotaj antaŭ la 5a de Julio al S.ro Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.


HORIZONTALE :

1) riverbordkreskaĵo (R) — 2) armilo (R) — 3) prepozicio — korpo sen propra formo por fari lumon (R) — 4) dua noto — anagramo de tre — fari (R) — 5) fremdlanda reĝo (R) — ilo por batali (R) — 6) sufikso — pron. pers. — 7) AK — sufikso — imagita estaĵo de la Skandinava mitologio (R) — adverbo de loko — sufikso esprimante malestimon. — 8) malprofunda vazo (R) — ne cedema, ne konvinkebla — kolekto, granda kvanta (R) — 9) agi, fari (R) — Eŭropano — antaŭaĉeti (R) — 10) kutimo, modo ĝenerala — prep. de direkto — RR — sin ĵeti kontraŭ iu por batali (R) — 11) parenco (R) — la flugado — 12) akrepinta fera peco (R) — konkluda konjuncio — inklino (R) — skrapi kampon — 13) granda akvujo (R) — preni, konsumi (R) — veturi sur akvo (R) — ege ŝati (R) spaco (R) — 14) malklara bruoj (R) — raba mambesto (R) — ĥemia olea substanco uzata por farboj (kraĵonoj) (R) — 15) piedvesto (R) — diservo (R) — adverbo (pli ol sufiĉe) — AK — 16) nombro — 17) TK — prepoz. — 18) metalo — malricevi (R) — 19) oficiala konigo al popolo, al publiko (R) — 20) bonodora — siropa substanco el restaĵoj de rafinita sukero (R) — 21) malvira — ne pli multe — 22) fabela estaĵo gardante trezorojn en la interno de la tero — loĝloko (R).

VERTIKALE :

1) frukto (R) — havas ĉiuj kaj ĉio (R) — 2) arbo — okazas je naskiĝo (R) — 3) partoj de fenestroj — RU — malvira (R) — 4) pron. pers. — lumo, nehela, nemalhela (R) — membro — 5) reĝestro — fari zzzz (R) — longa malprofunda ŝipo (R) — 6) insektmanĝanta birdo (R) — prepoz. — voĉo (R) — estro de universitato — 7) prepoz. — persono (R) — nombro (R) — nerustebla ĥemia elemento — 8) ame tuŝi (R) — ekzisti (R) — pasia inklino al ali-

seksa persono (R) ord. numeralo — 9) trinkajo (R) — diservtablo (R) — domaĝo, perditaĵo sur maro — 10) koloro — parenco (R) — objekto por fari ion (R) — nomo de peco el dupersona ludo (R) — 11) artikolo — denove — Eŭropano (R) — karnavala kostumo (R) — 12) egala, simila (R) — nedifina adjektivo — samsona finiĝo de du versoj (R) — armilejo (R) — 13) angla ora monero ne plu ekzistanta (R) — membro — tro eleganta viro (R) — 14) pronomo pers. — universitato (R) — prepoz. — 15) persono kiu amas ion, kiu havas inklinon por io (R) — artikolo — dua noto — 16) kapkovrila (adjekt.) — malsano (R) — 17) tola ujo (R) — objekton, aferon (akuz.).



FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elken Donderdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Verbindingsstraat, 9.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringsstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.
Wilrijk: Daniel Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

OSTENDO Hotel-Restaurant VROOME

Bulvardo Rogier 20. Tel 37

Moderna komforto — Moderaj prezoj — Varma kaj malvarma akvo fluanta.

Prenu urbotramon 5 aŭ 6

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj

malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu

Abonantojn

kaj

Anoncantojn ?

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 120.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.